

J. M. PROGIANTE

ILUSTRAĴOJ DE HELOÍSA MAKIDA NAKASHIMA

# DRAMO EN LA URBO DE LA LEGENDOJ



Esperanto-Asocio de Sanpaŭlo

|                         |                                     |
|-------------------------|-------------------------------------|
| <b>Originala titolo</b> | Drama na cidade das lendas          |
| <b>Traduko</b>          | J. M. Progiante                     |
| <b>Ilustraĵoj</b>       | Heloisa M. Nakashima                |
| <b>Enpaĝigo</b>         | José R. Tenório                     |
| <b>Eldonado</b>         | Esperanto-Asocio de Sanpaŭlo (EASP) |
| <b>Unua eldono</b>      | Sanpaŭlo, 2026                      |
| <b>ISBN</b>             | 978-85-67422-27-5                   |

*Ĉi tiu verko estas uzebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo  
Tutmonda, kun atribuo kaj sen modifo (CC BY-ND 4.0),  
disponebla ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/bynd/4.0/>*

|                   |                               |
|-------------------|-------------------------------|
| <b>Traduko</b>    | © La aŭtoro (2026)            |
| <b>Ilustraĵoj</b> | © Heloisa M. Nakashima (2026) |

P96451d

Progiante, José Mauro.

Dramo en la urbo de la legendoj / José Mauro Progiante. – 1a. eld. - Sanpaŭlo:  
Esperanto-Asocio de Sanpaŭlo, 2026.

100 p.: il. color.; 20 x 20 cm

ISBN 978-85-67422-27-5

1. INFANA LITERATURO. 2. DETEKTIVA HISTORIO. I. Nakashima, Heloisa  
Makida, *ilustr.* II. Titolo.

CDD 028.5

Kataloga slipo pretigita de Neide Ap. de Freitas – CRB-8/9091.

## PATRO KAJ FILO KOMPLICULOJ?

**S**injoro Ĉango tagmanĝis, kiam lia filo Jano alproksimiĝis. Ne estis nova la movo, kiun li faris, balancante la kapon por forigi la longajn harojn de antaŭ la okuloj, tamen la patro rimarkis, pro la rapideco de liaj gestoj, ke la filo estas nervoza.

— Patro — li diris, rigardante la plankon —, mi bezonas vian permeson por vojaĝi kun amikoj en la venonta semajno, kiam komenciĝos miaj ferioj.

Sinjoro Ĉango fermis la okulojn kaj spiris profunde, sentante, ke alvenis la momento diri al la filo ion, kion li retenis antaŭ multaj tagoj. Li respondis ridetante, per du demandoj, en tia maniero, ke surprizis la filon, ĉar kvankam ĝenerale li estis bonhumora kun siaj amikoj, li malofte ŝercis hejme.

— Kiam vi diras “permeson”, vi volas diri ankaŭ “monon”? Kaj kien vi intencas vojaĝi?

— Ne, patro, mono ne estas problemo... Pli bone dirite, certe mi bezonas vian helpon por pagi la bileton. Ni iros al Ŝanhajo. Forgesu, ke mi diris, ke mono ne estas problemo. Mi ankoraŭ ne perlaboras kaj...

— Vi ne bezonas klarigi, filo. Mi scias, ke vi monŝparas. Antaŭ kelkaj tagoj mi malfermis tirkeston de via skribotablo por serĉi kalkulilon kaj mi vidis, ke vi jam havas bonan sumon. Mi eĉ proponus, ke vi deponu ĝin en bankon....

Aŭdinte tion, Jano paliĝis. Kaj li sentis sian koron ekbategi, kiam li levis la okulojn kaj vidis, ke la patro ankoraŭ ridetas. Li ne kapablis difini, ĉu ĝi estas rideto de malkonfido aŭ de ironio. Tiam li decidis diri ion, ne sciante, ĉu li kredos aŭ ne:

— Mi ŝparas preskaŭ ĉiom, kiom vi donas al mi, kaj cetero mi faris kelkajn laborojn por S-ino Ĉuna, la najbarino mortinta en la pasinta monato. Mi eĉ volas iri al Ŝanhajo ĉar mi eksciis, ke tie estas multaj laborŝancoj por junuloj.

En tiu momento, la patro de Jano faris ion, kion li neniam antaŭe faris, tute neatendite. Li premis la ŝultrojn de la filo, fikse rigardis en liajn okulojn, forte palpebrumis per la maldekstra okulo kaj parolis mallaŭte, kvazaŭ dirante sekreton:

— Knabo mia, mi scias, kiaj estas tiuj laboroj, kiujn vi faras. Mi scias ankaŭ, kion vi intencas fari en Ŝanhajo, kaj mi scias eĉ, kiun vi intencas renkonti tie. Sed vi ne iros, ĉar mi jam havas aliajn planojn por ni.

— Kiujn planojn? — demandis Jano, ektimigite.

— Forgesu Ŝanhajon kaj viajn nunajn laboretojn. Mi kaj vi iros al Vankuvero, en Kanado. Ni laboros kune, pri io granda, kaj gajnos multe da mono tie. Ne indas sin riski liverante drogojn al toksomaniuloj kaj farante ŝteteletojn, se ni povas apliki majstrajn ruzaĵojn al raraj kaj multvaloraj objektoj. Kion vi pensas pri tio?

“Li jam scias pri ĉio” — pensis Jano. “Li scias, ke mi estas krimulo.”

Ondo de malvarmo trakuris la spinon de la junulo. La sinteno de la patro vekis en li kontraŭdirajn pensojn kaj sentojn. Li sentis honton, sed



samtempe malŝarĝon, ĉar li ne estis riproĉata. Kaj li estis ankaŭ malĝoja, eksciinte, ke la patro, kiu estis por li ekzemplo de honesteco, volas komplici kun li por krimoj. Li devis fari grandan klopodon por paroli nature:

— Kiel bone, patro. Ni faros bonegan laboron kune. Nun mi bezonas foriri, ĉar mi malfruas por la lernejo.

— Atendu nur unu plian minuton — diris sinjoro Ĉango, prenante pakaĵon, kiu estis sur la tablo, kaj enmanigante ĝin al la filo. — Estas kondiĉo, por ke vi vojaĝu kun mi: legi ĉi tiun libron, de la unua ĝis la lasta paĝo, antaŭ ol ni alvenos tie.

Jano ŝiris la paperon kaj reagis kun grimaco:

— Legendoj de Vankuvero? Vi scias, ke mi ne ŝatas legi.

— Mi scias, sed pensu bone. Tio estos malgranda peno por havi vian karan patron apud vi, en tiu kariero, kiun vi elektis, ĉu ne? La homoj, kompreneble ankaŭ la policianoj, kutime ne suspektas tiujn, kiuj legas librojn.

Komprenante la ironion, la junulo haste foriris. En lia kapo daŭre restis la bildo de la patro palpebrumanta al li, kvazaŭ kompliculo.

## KRIMULO AŬ GARDANTO?

**P**roksime de tie, kie sinjoro Ĉango kaj lia filo interkonsentis vojaĝi kune al Vankuvero, preskaŭ en la sama horo okazis alia familia konversacio.

Hua, tre ordema, jam ekpakis sian valizon por la ĉiujara vojaĝo al la kongreso de la internacia lingvo. En tiu jaro ĝi okazos en Kanado, en la urbo Vankuvero.

Dum ŝi rigardis la libroŝrankon en la vivoĉambro, ŝi estis observata de sia patro, sinjoro Ningo, viro ankoraŭ juna, iom pli ol kvardekjaraĝa, kiu tamen ŝajnis esti pli maljuna, pro sia kurbigita dorso.

Li kreskis en la kamparo kaj ekde la plej frua infanaĝo helpis sian familion en rizoplantejo. Tie li pasigis longan tempon klinita, kun la piedoj en la akvo. Kiam li iĝis dekokjara, li translokiĝis en urbon. Ĉar li frekventis lernejon dum tre mallonga tempo, li trovis nur pezajn laborojn, en konstruejoj. Kiam Hua, lia nura filino, estis trijara, li fariĝis vidvo, kaj ekde tiam li vartis ŝin, kvazaŭ ŝi estis delikata floro, ĉion farante por ke ŝi havu tion, kion li neniam povis havi.

— Mia filino, mi scias, ke vi ŝategas legi, sed ne troigu. En la pasinta jaro ni devis pagi pro troa багаĝo, pro la kvanto da libroj, kiujn vi kunportis.

— Alkutimiĝinta al tia tenera riproĉo, Hua aliĝis al la amuzo kaj respondis, turnante sin al li:



— Estas via kulpo, pro aĉetado de tiom da libroj por mi. Tamen ĉijare, malsame, mi kunportos nur unu libron, ĉi tiun: “Legendoj de Vankuvero”, kiun vi aĉetis por mi hieraŭ. Ni devos plenumi taskon pri ĝi dum la...

En la mezo de la parolo ŝi haltis, kiam ŝi vidis, ke la patro frotas la okulojn, ŝajnigante, ke li provas forigi aĵeton el ili.

Ŝi memoris, ke estis tiel ankaŭ en la antaŭaj jaroj. Ĉiam, kiam alproksimiĝis la tago de ŝia vojaĝo, la patro emociiĝis. Ŝi provis trankviligi lin:

— Ne afliktiĝu, paĉjo, mi povas zorgi pri mi mem.

— Jes, filino, sed ĉu vi promesas, ke ĉifoje vi ne metos vin en ian ajn embarason? Vi ĉiam diras, ke estas nur renkontiĝo kun aliaj infanoj...

— Ĉifoje la renkontiĝo estos de antaŭadoleskantoj — ŝi diris karese, interrompante lin. — Ni ne plu estas infanoj.

— Nu bone, adoleskantoj. Kaj kial mi devas resti pli trankvila? Se, kiam vi estis infanoj, vi jam implikiĝis en ostaĝigoj, raboj, atencoj...

Hua sciis, ke pri tio ŝia patro pravas. Ĉiujare ŝi kaj ŝiaj amikoj planis pasigi semajnon pace en la kongreso, sed ĉiam okazis io neatendita. Eĉ tiel ŝi provis malpliigi la gravecon de tiuj aventuroj:

— La personoj troigas, paĉjo. Ni spertis kelkajn neantaŭviditajn situaciojn, sed ĉio finiĝis bone. Kaj ĉifoje mi havos gardanton, ĉu ne? Via eta Hua estos gardata de la kuraĝa Majstro Ĉango. Cetere, mi ne scias, kia li estas, mi neniam vidis lin. Ĉu vi havas foton lian? Ĉu sur la foto li aperas rompante stakon da brikoj per karatea bato?

Sinjoro Ningo emis ridi, sed li klopodis resti serioza kaj faris unu plian prediketon al la knabino, kiu estis ĉio en lia vivo:

— Ne ŝercu, Hua. Kiel mi eksplikis al vi, sinjoro Ĉango estas mia amiko jam de multaj jaroj kaj li estas honesta homo, kiun mi plene fidas. Estis tre bonŝance, ke mi renkontis lin hieraŭ, kiam mi eliris el la librovendejo, kaj eksciis, ke ankaŭ li estos en Vankuvero dum la venonta semajno.

— Antaŭ proksimume dek kvin tagoj mi parolis al li pri vi kaj via vojaĝo kaj en tiu momento li ne multe atentis pri tio. Ŝajnis al mi hieraŭ granda koincido, ke ankaŭ li vojaĝos tien kaj subite interesiĝis pri la kongreso, pri vi kaj viaj amikoj. Li interesiĝis eĉ pri la libro de legendoj, kiun mi ĵus aĉetis. Sed, finfine, tio estas feliĉa koincido.

— Fakte tio estas granda koincido — opiniis Hua. — Ĉu li diris, kial li devas subite iri al Vankuvero?

— Ne, filino, kaj mi ne demandis lin pri tio, por ne ŝajni entrudiĝema. Bone, sed tio ne gravas, ĉu? Kio gravas estas, ke li, sciante kiom antaŭzorgema mi estas, tuj disponigis sin por zorgi pri vi tie. Li havos vian adreson kaj vi havos lian. Povas okazi, ke vi eĉ ne vidos unu la alian, ĉar Vankuvero estas urbego, sed se iumomente vi renkontos lin, traktu lin kun respekto. Tute ne parolu “Majstro” Ĉango. Li ja estas majstro, bonega instruisto pri matematiko kaj eminenta kaligrafo, tamen li povas ofendiĝi pro tiu ŝerco. Nur estu singarda kun lia filo. Malfeliĉe li vojaĝos kun la patro. Mi ne ŝatas lin, li estas stranga junulo.